# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 19. – REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. – Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

El Informletero (peresperanta) de Unio de Militantaj Ateistoj (UMA) en USSR

## Kiel progresis la kontraŭreligia instruado.

En sia laboro Ateista Unio multe atentas edukadon de siaj membroj k tiuj tavoloj de laboruloj, kiuj alproksimiĝis al la Unio. La vasta propagando k agitado — jen, per kiuj metodoj batalas UMA kontraŭ religio. Jen kiel problemoj pri kontraŭreligia instruado estas multe atentataj en laboro de la Unio.

La kontraŭreligia instruado kaptas ne nur membrojn de UMA, sed ankaŭ ĉiujn laborulojn, interesiĝantojn pri ateismaj problemoj, k dezirantaj tiudirekte ricevi tiun aŭ alian scion.

Reto de la kontraŭreligia instruado konsistas el ateistaj rondetoj, seminarioj, kursoj, kontraŭreligiaj laborrist-kamparanaj universitatoj, k kontraŭreligiaj fakoj k cikloj en superaj lernejoj.

R O N D E T O J. Komenca ero en la ĉeno de kontraŭreligia instruado estas rondetoj, en kiuj la aŭskultantoj konatiĝas kun elementaj problemoj pri la ateismo. En ateista rondeto ĝenerale oni povas renkonti homojn, kiuj definitive ne foriris de l' religio. Ili vizitas ateistajn rondetojn kvazaŭ por ekzameni sian opinion pri religiaj k ateismaj problemoj. Ofte okazas, ke tiuj ĉi ŝanceliĝantaj fariĝas aktivaj ateistoj k foriĝas de l' religio.

Por la rondeta laboro Centra Konsilantaro de UMA eldonis 3 tipojn de kontraŭreligiaj lernolibroj: por laboristaj, kamparanaj k ruĝarmeanaj rondetoj. Krom la lernolibroj estas eldonitaj programoj k rekomenditaj listoj de kontraŭreligia literaturo, estas eldonataj diversspecaj lerniloj. Ateistaj rondetoj faras ne nur pure lernan laboron. Ili organizas ekskursojn en muzeojn, ekspoziciojn, kolektive vizitas teatron k kinon, k la plej instruitaj mem gvidas kontraŭreligian propagandon en produktejoj, vilaĝoj ktp.

Necesas memorigi, ke en la rondetoj oni okupas sin en libera de la laboro tempo; k ke en rondetojn oni akceptas ekskluzive laŭ la sendeviga principo. La statistikadon de la rondetoj UMA ne aranĝis. Malesto de statistiko estas klarigata per tio, ke ateista rondeto estas tiom disvastigata formo de instruado, ke ĝi estas ĉe ĉiu laborista klubo, ĉe ĉiu produktejo k en multaj vilaĝoj.

S E M I N A R I O J. Se ateistaj rondetoj liveras nur elementajn sciojn, la seminarioj preparas la aŭskultantojn por la praktika kontraŭreligia laboro: ili preparas propagandistojn, agitantojn k gvidantojn por ateistaj rondetoj. Krom tio estas organizataj specialaj seminarioj el instruistoj de lernejoj, laboristaj fakultatoj k teknikaj lernejoj. Estas organizataj apartaj kontraŭreligiaj seminarioj por medicinaj laborantoj ktp. Ankaŭ en seminarioj oni studas dum libera de laboro tempo. Memkompreneble, ke aliĝo al seminarioj (ankaŭ kiel al rondetoj) estas ekskluzive propravola. Materie la seminario siajn aŭskultantojn ankaŭ neniel ligas.

K U R S O J. De la j. 1924/25 en diversaj lokoj oni komencis organizi kontraŭ-religiajn kursojn. Mallongtempaj kursoj por pli-spertigo de kontraŭreligia aktivularo estas praktikataj en la laboro de UMA. En la j. 1926 oni kalkulis 49 kursojn, en la j. 1927 ĝis 65, en j. 1928 — 89. Kursoj estas fondataj en subdistrikta, distrikta k respublika skalo. Ilia tasko estas re-spertigi laborantojn gvidantaj kontraŭreligian laboron, por pligrandigi ilian kvalifikon.

K O N T R A Ŭ R E L I G I A J U N I V E R S I T A T O J. Sperto de laborist-kamparanaj universitatoj montris, ke ili estas bonega rimedo por la amasa edukado al kontraŭreligia aktivo k por amasa kontraŭreligia instruado.

Programoj de la laborist-kamparanaj kontraŭreligiaj universitatoj estas skizitaj por 1, 2, k 3 jaroj, k enhavas ĉefe jenajn partojn: 1. Dialektika k historia materialismo (marksismo k religio). 2. Naturscienco k religio. 3. Historio de la ateisma penso. 4. Deveno de la religiaj kredoj k historio de religioj. 5. Taskoj k metodoj de kontraŭreligia propagando.

La kontraŭreligiaj universitatoj ekaperis en fino de 1928. Al somero de 1929 ekzistis jam 11 kontraŭreligiaj universitatoj. Dum vintro de 1929 ĝis 30 ni havas informojn pri 35 kontraŭreligiaj universitatoj. Instruado en tiuj universitatoj okazas ĝenerale 2—4 fojojn dum semajno, vespere, en libera de laboro tempo. En Moskvo estas organizita speciala kontraŭreligia radio-universitato.

*

En U S O N O kuraĝa grupo de geintelektuloj batalas sub direkto de sia prezidanto Charles Smith kontraŭ religio k ĉiuj formoj de superstiĉo. Per radioparoladoj, broŝuroj k flugfolioj oni klopodas penetri en malklaron regantan en tiuj ŝtatoj. Por la multnombra loĝantaro de hispana origino oni ne nur eldonis flugfoliojn: "La evoluo sen dio" k "La biblio en la pesilo" en angla, sed ankaŭ en hispana lingvo. SAT-anoj ekster Usono, kiuj interesiĝas ricevi tiujn flugfoliojn senkoste, ĉu en angla, ĉu en hispana, mendu kun sciigo pri ekspedmaniero al terorlandoj ĉe ano 13 607, Zeist, Nederlando.

## Ateistoj el tuta mondo nepre subtenu nian planon

Dum la dua duono de januaro 1931 oni aranĝos en *Leipzig* grandan *Kultur-Ekspozicion* aranĝotan de la Interesasocio por Laborista Kulturo (IFA). Ĉi tiun ekspozicion ankaŭ partoprenos la Asocio de Proletaj Liberpensuloj, Leipzig. Por instali nian liberpensulan fakon ege instrue, ni petas la kunlaboron de liberpensulaj organizoj k unuopaj liberpensuloj. Subtenu nin per alsendo de materialo. Sendu gazetojn, librojn, broŝurojn, flugfoliojn, afiŝojn, bildojn, fotojn, insignojn, statistikojn, grafikajn figurojn, murgazetojn, objektojn kiel: rozarioj, horoskopoj, alumetoj, talismanoj ktp. Ĉion rilate al liberpensismo, kremacio, neortodoksa karito, religio, eklezio, okultaj sciencoj, sektoj, cenzuro ktp. sendu al suba adreso. Travidu viajn arkivojn, trastudu viajn protokolarojn k faru kopiojn pri interesaj aferoj el pli fruaj tempoj. Ĉar la materialo de la Kultur-ekspozicio estu fundamento por migranta kontraŭreligia ekspozicio, ni petas ĉe alsendo de materialo indiki, ĉu la materialo povas resti en la manoj de la gvidantoj de la liberpensul-ekspozicio aŭ ĉu la materialo nur estas donata pruntedone. Ĉiuj materialoj estos asekurataj.

Sendu vian materialon tuj al: Verband Proletarischer Freidenker, Ausstellung *Leipzig C 1*, Dösner Weg 23.

Esperantistoj Ateistoj traduku k enmetu la alvokon en via liberpensula gazeto aŭ landa esperanto-gazeto. Ne forgesu aldoni al via materialo negermanlingva, sur aparta folio, telegramstilan esperantan tradukon. Ĉiun helpanton ni rekompencos.

Kulturekspozicio IFA
L i b e r p e n s u l a Fako
Komisiite: Kurt H u b r i c h t.

## RAPORTO

*pri la S A T-Liberpensula Fakkunsido okazinta je 5. aŭgusto 1930 en la kongresejo (neoficiala pro neĉeesto de iu komitatano de la Sekcio).*

Post interŝanĝo de opinioj pri la agoj de liberpensuloj k pri religio la kunveno konstatas, ke en ĉiuj landoj la liberpensuloj havas gravegan taskon plenumendan, ĉefe la SAT-Liberpensuloj, kiuj povus esti la perantoj por la tutmonda liberpensularo. Ni do streĉu niajn muskulojn por kiel eble plej efike plenumi dece nian laboron. Al ni jam ŝajnas, ke ĉiu SAT-ano devus esti liberpensulo k pro tio esprimas la deziron, ke SAT-ano ne estu ano de ia ajn eklezio.

Ni bedaŭras, ke neniu komitatano ĉeestas tiun ĉi gravan kunsidon. Tio